


# ASISTILO



# Hejmoj

CPPAP n°71486

**Bulteno pri esperantaj komunumoj**

(Supplément à *Asistilo* n° 23), somero / aŭtuno 1999, N-ro 13

## Gésillon *salvenda est!*

Jes ja la kastelo Grésillon estas nepre savenda, kaj tion ĉi decidis la preskaŭ 900-homa membraro de la *Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj* per sia tiea Ĝenerala kunveno, la 31-an de oktobro 1998.

Pri kio do temas? Pri kastelo kun 18-hektara tereno, aĉetita de esperantistoj antaŭ preskaŭ duon-jarcento por ebligi al samideanoj el ĉiuj landoj renkontiĝi kaj partopreni en staĝoj lingvaj aŭ kulturaj.

Sed en julio 1997, tri tagojn post la malfermo de la somera akceptado, komisiono pri sekureco vizitis la kastelon kaj volis tuj fermigi ĝin. Tamen, ĉar aliĝintoj el pluraj landoj jam ĉeestis, la aktivaĵoj rajtis daŭri ĝis septembro.

Tiam oni venigis specialistan entreprenon kaj alian komisionon, kaj en oktobro la Komitato decidis ŝanĝigi la tutan elektran cirkvitan kaj instaligi ↗



→ sistemon de fundetek-tado (400.000-frankaj laboroj, finitaj en junio 1998).

Bedaŭrinde, nur tri tagojn antaŭ la ekgastigado de multaj samideanoj partoprenontaj en la Montpellier UK, alvenis kompleta malpermeso uzi la kastelon.

Kaj eĉ ĉi-jare la gastoj rajtis uzi nur la teretaĝon, sen la kuirejo: ĉiuj devis do aŭ tendumi aŭ tranokti en hotelo, kaj venigi la manĝojn de ekstere.

( Intertempe venis jam pli ol 250.000 frankoj da mondonacoj por daŭrigi la necesajn laborojn: aranĝo de ŝtuparo por rajti uzi la dormoĉambrojn de la du supraj etaĝoj (80 litoj), kun kontraŭfajraj pordoj; same en la kuirejo por rajti taŭge prepari manĝaĵojn; nova centra hejt-sistemo, ktp. )

### **Bonvenaj bonvolemluloj: HIK-ano(j) en Grésillon?**

"Pli kaj pli malmultaj estas la volontuloj por zorgi pri la administrado, kultura kaj materia, de la staĝoj. Laciĝo aperas, kaj necesas novaj volontuloj por antaŭeniri!", tekstas la protokolo de la Ĝenerala kunveno 1998\*. En julio 1999 Christian Lavarenne partoprenis do en vizito de la kastelo kaj kunveneto kun parto de la komitato (la kasistino plus M.-Th. Lloancy kaj P. Naulet), el kio ĝermis skiza propono de plurjara surloka deĵorado, pritraktota dum ilia venonta Ĝenerala kunveno en oktobro 1999. Ĉu iam eĉ la HIK-sidejo translokiĝos en Grésillon? Antaŭ definitiva respondo, certe necesos plurmonataj studado kaj traktado.

\* Verkita de J. Ripoché, vidu *Kulturaj Kajeroj* 1998/4 p. 15.

## Primoštena Esperantujo

Post "amfibia ekspedicio" ĉe Adriatiko en 1960, kun d-ro Divjanoviĉ, Dir. de la zagreba Astronomia Observatorio de la Kroata Naturscienca Societo, por "trovi plej ĉarman maranguleton por la esperantista tendokampo", granda grupo de junaj astronomoj-esperantistoj unue vizitis Primoŝten post la observado de **totala suneklipso**, la 15-an de februaro 1961, sub la faka gvido de Prof. Randiĉ (neesperantista prez. de la astronomia societo).

### Bunta partoprenantaro

Jam la unuan someron (1961), "kvankam la kampadejo eĉ ne estis finkonstruita, pli ol 400 esperantistoj, preskaŭ el ĉiuj eŭropaj landoj, vizitis" ĝin. Hugo Kraus, la "afergvidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio", kiu mem partoprenis, raportis pri la vizito de la supera komandanto de la jugoslavia arma floto, **admiralo** Mate Jerkoviĉ : fine de bankedo, tiu ĉi "*akcentis sian simpation por pacamaj klopodoj de esperantistoj*".

Ŝtata subvencio ebligis la finkonstruon de la kampadejo antaŭ la sezono 1962, en kiu tre probable partoprenis **Emilija Lapenna\***, kiu kuntradukis dekkvinon da artikoloj kompilitaj en 46-paĝa dulingva *Kampadejo de Pacamikoj\*\**.

La saman jaron, "E-somerumejo *Zamenhof* (en Vallon Pont d'Arc, Francio) kaj E-somerumejo Primoštena **ĝemeliĝis** dank'al la merita iniciato de s-ano Petro Jayer". Pro tio "la ĉefstrato en la primoštena kampadejo estas nomita *Aleo Vallon Pont d'Arc*".

La somero 1963 estis ankoraŭ pli impona kun "pli ol 1000 esperantistoj kun siaj amikoj el 18 landoj", kaj **konstante "pli ol 600 personoj"** de la 1-a ĝis 20-a de aŭgusto.

Inter la prelegantoj estis la studentoj Kyotaro **Deĝuĉi** (estonta prez. de E-Propaganda Asocio de Oomoto) kaj **Yoŝimi Umeda** (estonta UEA-vic-prez. kaj poste ASISTI-prez.). Ili "alportis simblan ter-pecon de Hiroŝima grundo. Oni plej solene miksis tiun ĉi teron kun la primoštena grundo en la aparta bedo, najbare kun la bedoj kies **tero estas samtiel simbole miksitaj kun la teroj de la aliaj landoj** (Francio, Aŭstrio k.c.). Ĉeestis multaj gravuloj, ĵurnalistoj, radiotelevido k.c."

Ekde aŭtuno 1963, oni povis "per asfaltita ŝoseo veni rekte en Primoŝtenon".

\* "La 10-an VII.62. Tre kara Odette, post kelkaj tagoj mi forvojaĝos ferii en nian Primoŝten..."

\*\* Red. E.E. Salberg kaj G. Divjanoviĉ, Zagreb, 1962.

## Esperantista marŝiparo

Jam en 1960 ekzistis "*admirala*" ŝipo, sur kies velo estis la surskribo "ESPERANTO". Motorbarko kun esperanta flago (kaj sav-kanoto) estas videbla sur foto farita dum la somero 1961. Kaj en somero 1963 okazis "la akiro de la esperantista motor-vel-barko (oni fiere nomas ĝin "ŝipeto"!) *Esperanto*. Ĝia veturkapacito estas 10 personoj (sed, se ŝipas la junaj geastronomoj, neniam en ĝi estas malpli ol 15 personoj!)"

Sed la junaj astronomoj iomete enŝuldiĝis ĉe la aĉeto kaj, por kovri la ŝuldojn, devis ludoni la barkon al Turisma entrepreno de Primošteno kelkajn horojn ĉiutage. Bonŝance kovris grandan parton de la ŝuldoj monkontribuajoj de eksterlandaj amikoj, el kiuj la esperantista familio Turin (Francio) kaj Hugo Kraus, kies edzino estis la baptopatrino de la ŝipeto. Ĝi estis la ununura "internacia [mara] posedaĵo de la esperantistaro".

(Iam sekvote?)

## Novajoj pri Bona Espero

Amika renkontiĝo estis okazinta, dum la UK en Montpeliero, inter ges-roj Grattapaglia de la brazila *Bona Espero*, Eveline Rotellini de la *Sun-Kompanio* en Arrou, Christian de Balagué k.a.

Komence de tiu ĉi jaro pola paro, Krzysztof kaj Agnieszka, pasigis plurajn monatojn ĉe *Bona Espero*, (post entute pli ol dujara restado ĉe *Sun-Kompanio*). Gisela kaj Jean-François **Passarella**, (organizinto de la Montpeliera *Infana Kongreseto*), post unu monato tie, klopodas tien transloĝiĝi.

Cetere, dank'al la voĉoj de multaj samideanoj Ursula estis elektata en 1998 kiel "anataŭa delegitino al la Kongreso de la Popoloj" : gratulon ! (El la 20 delegitoj jam unu estas favora al esperanto : Georges Krassovsky, amiko de la HIK-sekretario kaj redaktoro de *Le Nouvel Humanisme*.)

## Nova biblioteko por HIK

Pli granda ĉambro estas refarbita kaj provizita per metalaj bretaroj ĉe la HIK-sidejo en Balagué. La libraro, ĉefe periodaĵoj kiuj amasiĝis en malgranda kaj iom malhela ĉambro, nun translokiĝas sur 40 metrojn da bretoj en pli ol 10 m<sup>2</sup> ĉambro (kun preskaŭ 50-procente pli larĝa fenestro).

**Okcitana antologio** red. de Ch. Lavarenne, 46 p. 30 FF + sendokostoj, ĉe : HIK, F-09800 Balagué.

Nia **suplemento** entenas 2 pliajn rakontojn. Se vi volas havi duan kompletan sendependan libreton, poste aldonu mezen de tiuj ĉi paĝoj la rakonton publikigitan en la venonta numero. (Tial la paĝnumerado estas interrompita inter p. 10 kaj 31.)

## Esperanto-komunumoj kaj projektoj

Estas skribitaj per **dikaj literoj** nur la komunumoj aŭ projektoj ankoraŭ **ne registritaj** en la antaŭaj listoj.

Colonie internationale ("Internacia Kolonio") kun ero en Parizo, 1904, 100.000. (L. [de] B[eaufont], (*L'Espérantiste*, 84 (1-1905), p. 20 k 22), H12 p. 6.

Erich-Mühsam-Centro, vidu : "Internacia Komunikilo-Centro".

"**Esperantista vilaĝo**", ĉe Weisser Hirsch (?) apud Dresden (D), 1908 : "23-an de aŭgusto, [je la] 9-a, vizito de Weisser Hirsch apud Dresden kaj granda festo en la "Esperantista Vilaĝo"." (*Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj*, Kajero 12-a, aprilo 1909, Paris : Esperantista Centra Oficejo, p. 13.)

Esperanto-domoj por la junularo. Raporto de s-ro Edmond Privat (...) [ĉe la UK en Dresden, 1908].

Grandaj nacioj aŭ gravaj religiaj sektoj havas kelkafoje *hejmojn* aŭ similajn instituciojn en kelkaj grandaj urboj de l' mondo ; sed junulo kiu apartenas nek al granda nacio, nek al unu el tiuj religiaj sektoj trovos neniun pordon malfermeblan.

Tiuj junuloj apartenas al *nia* nacio, ili estas la infanoj de l' homaro kaj vi mirus, eksciante kiom multe da ili jam lernis Esperanton. Ni nepre devas por ili fari ion, kaj ion praktikan.

Jam la U.E.A. kreis specialajn konsulojn por la junularo, kaj oni ne kreus ankaŭ E-domojn, kie troviĝus loĝejo, konsulejo, librejo kaj eble eĉ kunvenoj ? Ĝi estus ne nur hotelo por fremdaj junuloj sed ankaŭ klubejo kaj biblioteko, kie la esperantistaj junuloj de la urbo konatiĝus kun siaj fremdaj kolegoj ; kial ne diri *amikiĝus* kun ili, kaj ekhelpus ilin por eniĝi en la vivado de la urbo.

Eble al tiu E-domo baldaŭ alvenos la tuta esperantaro de l'urbo : la grupo, la biblioteko, la librovendejo, la Esperanto-oficejo, la konsulejo kaj ĝi tiel fariĝus bonega [?] centro.

**Kiu pagos ?** (...) Oni povas fari aranĝon kun esperantista hotelisto, aŭ esperantigi unu honestan hoteliston (...) La restaĵon povas pagi ĉu librovendado, ĉu instruado de la lingvo Esperanto, aŭ de aliaj lingvoj kiujn povus instrui la junaj fremdujoj. Ankaŭ restoracio (...)


(...) Ĝi estas afero tute ebla (...) Kiam viaj infanoj vojaĝos fremdlanden, vi estos tre kontentaj pri la ekzisto tie de E-domoj. (*Esperantista Dokumentaro...*, apr. 1909, E-ista Centra Oficejo, p. 99.)

Hejme, Czeladz (PL) : nur eldonejo.

Internacia Esperanto-kursejo, H13 p. 4.

Intern. kampadejo Ivo Lola Ribar: vidu *Esperantujo*.

Internacia Komunikilo-Centro (aŭ *Erich-Mühsam-Centro*) organizis en la Palatina Arbaro "renkontiĝon por ĉiuj anarkiistaj gekamaradoj", nomitan "Internacia tendaro", 13a-15a de septembro 1985.



En tiu ĉi domo Ljo loĝis dum 6 monatoj ; sed jam "ne plu estis sur la muro la granda A". (Li "forlasis tiun komunumon ĵus antaŭ tiu renkontiĝo", kaj "komence eĉ ne sciis ke ĝi estis anarkiista komunumo".)

Kampadejo de Pacamikoj : vidu *Esperantujo*, H13.

Kampadejo "Ivo Lola Ribar" : same.

Verda Bordo : nur unuokaza "Internacia Esperanto-Ripozejo" (*Esperanto Gazeto* 25 (12-1968), p. 4). □

## Esperantujo

Mi ion deziris, mi havas demandon,  
mi serĉas ian tre belan landon !  
landon kun por mi florantaj floroj,  
kie varmege batas la koroj.

Ho lando belega, ĉu vi ja ekzistas ?  
Sur nia tero kie vi troviĝas ?  
Lando, varmege dezirata,  
kie vi estas, ho mia amata ?

Al mia demando, mi scias respondon :  
amikaj koroj plenigas la mondon,  
lando floranta jam estis trovata,  
Esperantujo ĝi estas nomata.

M[arie] Hankel

("La unua Esperanto-poetino", 1844-1929, Reĝino de la *Internaciaj Floraj Ludoj* (Barcelono, 1909), fondintino de la *Esperantista Literatura Asocio*.)  
Muzikigita de F. de Ménil ; reprod. en *La Bela Mondo*, I-a Jarkolekto, Dresdeno : F. Emil Boden, 1908.

## Leteroj

Zupanovice, la 28-an de aprilo 1998

Estimataj amikoj,

(...) Revenante al la propono uzi terpecon de nia familia havaĵo por ia humanisma celo\*, **mi aldonas** : Ne estas ĉe mi ia konkreta plano kaj mi ne scias ĉu ekzistas iu grupo aŭ esperantista aŭ interreligia kiu kapablus utiligi la terenon. (Mi subtenas kelkajn ekologiajn iniciatojn en nia lando...) Dependas de la fakto ĉu iu grupo havas firman ideon (kaj monon) por utiligi la proponon.

**Karel Kraft** (Dobriš, CZ)

\* Mi kun mia filo kiu estas laŭleĝa posedanto, emas ludoni por simbola prezo kelkajn milojn da kvadrataj metroj al ekologia aŭ humanisma organizo, prefere ol disponigi ilin al moncela firmao. (El antaŭa letero lia, publikigita en *Asistilo* n-ro 21.)

Intertempe s-roj K. Kraft kaj Ch. Lavarenne mallonge renkontiĝis en Montpellier okaze de la antaŭlasta UK. Sed posta letero datita je **24-3-99** informis pri neantaŭviditaj komplikajoj kiuj preskaŭ tute malebligas konkretajn planojn. (*La Red.*)

1999-III-16

Kara Christian,

Multan dankon pro *Hejmoj*, kiu tuj rememorigis min pri la tre agrablaj pasintaj tagoj en Balagué. Ankaŭ kun granda intereso mi legis pri la statistiko de Esperanto-komunumoj.

La **Internacian Esperanto-kursejon en Pisanica** mi konas persone. Tie mi partoprenis dum kvar semajnoj, kune kun bulgaraj instruistoj, en la instrurajta kurso. La komisiono de edukministerio eĉ venis al Pisanica kaj faris ŝtatan ekzamenon. (Unu monaton post la ekzameno la bulgaraj instruistoj jam ricevis pli altan salajron, ĉar en Bulgario estis Esperanto-fako en la lernejoj, kiel libervola dua nenacia lingvo.

La tiam riĉa bulgara Esperanto-asocio eĉ pagis kelkajn kilometrojn da nova strato al Pisanica en la montaro. **Ĝis tiam, estis nur vejeto por azenoj.** En la ĝis tiam preskaŭ mortinta vilaĝo la vivo denove floris kaj la kamparanoj ricevis laborlokojn en la hotelo ktp. Bedaŭrinde ĉio paneis post la politika ŝanĝo.

(...) Korajn salutojn kaj ĝis la revido dum la UK en Berlino. **Wolf** (Eisenhüttenstadt, D)

**Jany kaj Jorgos** ĝojas anonci al vi la **naskiĝon de Floreal**, la 2-an de majo 1999 je la 13-a 20.

— Gratulon al la **HIK-sekretario** kaj lia edzino kaj elkorajn dezirojn de feliĉo al la tuta familio !

Kara samideano Christian-san\*, 25-3-1999

Multan dankon pro via akompano kaj veturado. Mi bonege pasigis tempon (...) Mi ĝuis vian ĉarman kantadon kun gitaro. Mi kun interesplena memoro reiros al Japanio. Ege bedaŭrinde, miaj vojaĝtagoj ne sufiĉis por ĝui plu la Esperanto-komunuman etoson kaj medion, kvankam mi kompreneble amikiĝis kun la surlokaj esperantistoj. Do mi denove vizitos.

Ĉion bonan kaj sanon al vi. Ĝis en Esperantio ! Sincere

**Hiroyo**

\* Japanoj uzas tion anstataŭ "s-ro" aŭ "s-ino".

## El la *Ora Libro* (sekvo)

**18-1-1999.** Ĉu ni devas skribi en Esperanto ? ...well, hmm, you know ?!!... Ni havis plezuron koni genton dinamikan kaj amikan en ĉi tiu regiono... Nian estonton ni konstruos, ne nullos : ĉio estu ni ! Bonvenon en *lou Larzac*.

**Claudine** [kaj] **François**

**26-7-1999.** Kara Christian, Dankegon pro via afabla gastigado kaj pro la suna vetero kiu akompanis nin dum niaj montaraj promenadoj. Post tiom da ŝvitado kaj malkovro de plej mirindaj lokoj, montoj, arbaroj, lagoj, akvofaloj, nun miaj kruroj sentas sin iom lacaj sed mia koro ege ĝojas [pro tio] ke ni renkontiĝis kaj havis tempon pli profunde paroli ol dum niaj pasintaj renkontetoj. Ĉiam mi tre feliĉos revidi vin ie ajn en la mondo. Ĝis la revido ! Tutkore kaj amike.

**Yves** [Bachimont]

Kara Christian, estis tre agrable pasigi kun vi iom da tempo en tiel belaj lokoj, parolante pri interesaj temoj, kantante ktp. Estas nepre daŭrigenda ! Ĝis !

**Klári** [Mikola]

**21-8-1999.** (...) Estis unu semajno bona, rapida : mi lernos esperanton kun ĝojego. *Do ĝis venonta fojo. Estonta esperantistino.\**

**Marie Teinturier**

*Bela pejzaĝo estas tiu Arieĝo, kaj kiel simpla kaj varma estis tiu akcepto. Oni nepre devos organizi ian internacian laborbrigadon en Arieĝo, kaj specife en Balagué !!! Miaj progresoj en Esperanto ankoraŭ mankas, sed ili alvenos, certe !\**

**Guy-Noël Teinturier**

Mi nomiĝas **Sophie**. Mi lernas Esperanton. Mi ne parolas bone sed mi studos diligente. Ĝis baldaŭ por la venonta kurso kaj\* dankegon.

*La suno ne videblis, sed ĉu ĝi ne ĉeestis en la profundo de niaj renkontiĝoj ?\** **Jean-Claude**

\* Tiuj ĉi kursivaĵoj originale estis en la franca.